Ludreguloj

Materialo : 40 kartoj por 4 ludantoj. 50 kartoj por 5 ludantoj ...

La ludocelo :

Restu tre atenta kaj reagu rapide kaj senerare por sukcesi formeti ĉiujn viajn kartojn. La malgajnanto estos tiu, kiu finos kun ĉiuj kartoj.

Antaŭ la ludo :

Klarigu pri la diraĵoj kaj gestoj ligitaj al la apartaj kartoj.
Disdonu ĉiujn kartojn. Ĉiu ludanto stakigas dorsflanke siajn kartojn antaŭ si.

Por ludi :

La partoprenantoj ludas laŭvice. La ludanto turnas sian supran karton kaj averse metas ĝin je la mezo de la tablo.
Se la karto estas unu el la kvar sube, ĉiuj ludantoj devas tuj reagi per diraĵo kaj eventuale gesto. Se la karto estas alia ol la kvar sube, ĉiuj devas resti mutaj kaj senmovaj.

Saluton, sinjoro



Saluton, sinjorino



Ĝis revido
Svingi manon

Dankon
Frapi la karton

Kiam iu el la ludantoj eraras, per nebezona aŭ netaŭga diraĵo kaj gesto, li devas preni ĉiujn kartojn de la mezo de la tablo kaj meti dorsflanke ilin sub sian kartaron. Kaze de la "Dankon" karto, kiam ĉiuj bone reagis, estas la laste frapinta ludanto, kiu devas kolekti la kartojn de la mezo de la tablo kaj aldoni ilin al sian kartaron.
Poste, ekludas la ludanto, kiu ĵus kolektis la kartojn de la mezo de la tablo.

Estu ĝentila !

Ludo por 2 ĝis 6 ludantoj.
Ajna aĝo.
15 minutoj.

Dua nivelo :

Aldoni aliajn diraĵojn kaj gestojn por kelkaj kartoj.
Ekzemploj :

Ne dankinde !

Je via sano !
Kunfrapi pugnojn



Mi pardonpetas !
Mano sur la buŝon.



Bonvolu sidiĝi.
Sidiĝu, mi petas.

Bonan apetiton !

Bonan matenon !
Stariĝi

Aŭtorino : Isabelle Saulnier
http://ludoj.neowordpress.fr
isabellesaulnier@outlook.fr

Por kvar ludantoj, printu kvarfoje la paĝon. Por kvin ludantoj, printu kvinfoje la paĝon ...